# HACE

Horizonto de Afrika Centro Esperantista - Numero 01-23 - Dato: Augusto 2023









# E N H A V O

**Malferme**

**ALIMANIERA AGADO**

A- NOVJARA MESAĜO DE AFRIKA CENTRO ESPERANTISTA : NI PENSU ALIMANIERE !

B- AGADORIENTIĜO

C- EPI-IPE (Esperanto Per Io - Io Per Esperanto)

**TR'AFRIK**

I- Raportoj pri agado

1- Raporto pri la agado de Afrika Centro Esperantista en 2022

2- Raportoj pri agado tra Afriko

i- Zamenhoftago-festo

ii- Agado en unuopaj landoj

**LERNOKAMPO**

Ordo de vortoj en frazo

**KOUĈEJO**

1- Pripensu ni

2- Rimarku ni

3- Rolo de tiu ĉi rubriko KOUĈEJO

**VIDPUNKTOJ**

KOGNOVOJOJ

**FELIETONE**

MIA KREDADO I

"Religiaj aferoj devas esti fonto ne de diskordoj, sed de konkordo."

(GBEGLO Koffi)

**VERDAJ PLUMOJ**

1- La fiŝisto

Jeandedieu KIKAKO

2- EN MIA VILAĜO

Verkis ETIENNE LUHEKA Kaj MARCELIN LUHEKA

**RIDO-ANGULO**

Rampolernejo

**RAKONTOJ**

1- ALLOGA LOKO

(CLUSE Zissè Florent)

2-LA VIVA KAJ LA NUTRA KONDIĈOJ DE LA PORKOJ EN ANYRONKOPE

**ANONCETOJ**

I- Servoj de ACE

1- Subtenagado de ACE en 2023

2- Aparta alvoko al esperantistoj en landoj najbaraj al Togolando

3- Antenigo kaj anteniĝo de ACE

**II- KOMUNA EUROPA REFERENCO-KADRO POR LINGVOJ (KERKL)**

**MALFERME**

## ĈU ĈIAM TIEL ĈI KIEL IAM ANTAŬE AŬ ALIIEL ?

Antaŭ pli ol cent jaroj estis vilaĝo, kies anoj estis agrokulturistoj. Ankaŭ la anoj de la posta generacio estis tiaj. Nun estas preskaŭ tria kaj kvara generacioj, sed nenio ŝanĝiĝas. La anoj de la nun lasta generacio iras la spurojn de la pragepatroj. Ĉu ĉiuj ? Necesas sekvi paŝojn de kelkaj el ili.

Kiam Jao decidis lerni metion en urbo, tuj la gepatroj reagis :"Ĉu niaj pragepatroj ion tian faris antaŭe ? Kial vi volas tion fari nun ?" Tiuj vortoj ĉiam ripetiĝas kiam anoj de la nova generacio klopodas fari ion, kian iliaj antaŭuloj ne jam faris. Ĉu oni devas ĉiam fari nur tion kion la antaŭuloj faris ?

Jao estas nun 25-jara kaj tute forlasis la kutimojn de la gepatroj. Li spitis la dirojn de siaj gepatroj kaj vizitis urbon. Tie li lernis metion, kaj kondutas tute alimaniere. Kiam li revenis al la naskiĝvilaĝo, liaj faroj plejparte malsimilas tiujn de siaj samgeneracianoj.

Jao manĝas ne plu per manoj sed pere de forkoj kaj kuleroj. Li surmetas jakon, pantalonon kaj eĉ enirante lokojn kie homoj estas nur kun tukoj ne ĉemizaj, Jao ĉiam havas sur si siajn urbajn vestojn. Kiam reagas la vilaĝanoj, Jao klopodas ion klarigi, sed li estas tute ne komprenata. Jen Jao devis pasigi plurajn monatojn en la vilaĝo por gvidi laborojn ŝtatajn. Ĉu li reiris al la kutimoj siagepatraj aŭ daŭrigi kun tio, kion li akiris en la urbo ? La situacio estas iom malfacila al Jao, ĉar preskaŭ ĉiuj liaj samaĝuloj malproksimliĝas de li, sed jen io !

Klarigoj de Jao igis ke kelkaj junuloj ekkomprenetis lin. Jao tute ne cedis kaj pluiradis sian vojon. Klarigojn post klarigoj homoj aliĝas al lia konduto, sed ne ĉiuj pretas konduti kiel li. La homoj estas tiom konservemaj, ke iuj eĉ marĝenigas Jaon. Tiu ĉi tute ne senkuraĝiĝas, kaj iam parolis pri naturleĝo "Nenio estas senŝanĝa en la naturo, sed ĉio ĉiam aliiĝas". Tiaj vortoj vere donas pli da forto al Jao sukcese vivi kun la vilaĝanoj kvankam ne ĉiuj pensas kiel li.

Vere malfacilaj estas la laboroj de Jao, sed ili estas neeblaj ? Jao pensas, ke li

devas daŭrigi siajn klopodojn kun la certeco, ke iam multaj homoj aliĝos al lia pensaro. Klaras, ke homoj mem nature estas konservemaj, kaj tial oni devas tute trankvile trakti ilin, kiam oni klopodas enigi novan penson en ilin. Ĉu tia estas  la situacio en ĉiuj homogrupoj ? Kio pri la Esperanto-movado precipe afrika ?

Ĝis nun kiom da esperantistoj profesie laboras per Esperanto ? Kiuj vivtenas sin per Espepranto ? Oni povas citi kelkajn sed kiom ili estas kompare kun la miloj da Esperantistoj tra la mondo? Kiun edukon oni havu por perlabori Esperanton ? Kiujn planojn havas Esperanto-parolantoj, ke esperantistoj uzu siajn sciojn esperantajn por vivteni sin ?

Esplorante la Esperanto-movadon, oni malkovros, ke tiaj ideoj pri perlaborado de Esperanto preskaŭ ne ekzistas. Esperantistoj nur baziĝas sur donado/ricevado de donacoj por lernigi Esperanton. Jen do iuj esperantistoj fariĝis kaj estas eternaj petantoj. Ĉu plu estu  tiel en la estonteco, proksima?

Ŝajnas, ke klopodoj estas nun farataj en la mondo, ke tia sistemo vere sekvu la naturan leĝon pri ŝanĝiĝo de ĉio en la naturo. En brazilio oni parolas pri esperanto-ekonomio, kaj en Togolando ACE (Afrika Centro Esperantista) klopodas por/per sia sistemo EPI-IPE. Esperantistoj ne plu atendas ian finan venkon kiam Esperanto estos uzata preskaŭ de la tuta mondo. Tiuj ĉi esperantistoj asertas, ke Esperanto estas nun vivanta lingvo kiel aliaj tiaj lingvoj kaj tial ĝin oni uzu por fari kion oni faras per ĉiuj aliaj lingvoj vivantaj. Ĉu tio eblas ?

En ĉiu afero farota/farenda, gravas ke oni ĉiam faru la unuan paŝon. Nur per tio oni faros pliajn milojn da paŝoj vojante al plena sukceso. Estas nun la momento fari tiajn unuajn paŝojn kaj jen ttio alvokas la prizorgantojn de ACE. Vortoj en tiu ĉi unua numero de HACE en 2023 aludos pri tio kaj samtempe skizas paŝojn kouaĉajn, kiuj estas ege subtenaj al novaj ideoj sukcesigaj. Malkovru mem !

La redakcio

# ALIMANIERA AGADO

## A- NOVJARA MESAĜO DE AFRIKA CENTRO ESPERANTISTA

**NI PENSU ALIMANIERE !**

Ni naskiĝis, vivis kun niaj gepatroj veraj aŭ adoptaj, kreskis, kreskas. Ni tiel konstruadas nian vivon laŭ la modeloj de tiuj de niaj gepatroj ĉiaj. Ni kvazaŭ faras ĝuste tion, kian faradis niaj gepatroj. Ni simple vivas kvazaŭ ili. Se ili suferadis, ankaŭ ni nun suferadas. Se ili vivadis feliĉaj ankaŭ ni nun vivas feliĉaj ĉar ni iras nur laŭ la spuroj, kiujn ili desegnis vole/nevole, konscie/nekonscie en ni. Ĉu ne estus bone ke ankaŭ ni eksperimentu ion alian por vidi kio okazos ? Jes, ni agu alimaniere pensante alimaniere. Tiel devus iri la mondo.

Kiu scias, kio estas nur bona aŭ malbona ? Certe ne jam naskiĝis tiu ? Kial do ni devas ĉiam sekvi nur vojojn de aliaj sen trovi propran pri kiu ni respondecu. Unue ni havu bazon, kaj tiun ni konstruu laŭ la modelo de niaj antaŭloj. Kaj poste ni devas pensi pri propra.  Jes, ĈIU FOSU SIAN SULKON, ĉu ne ?

Nun pripensu vian vivadon ! Kiel vi vivis antaŭ dek jaroj, ĉu tiel vi vivas ankaŭ nun ? Ĉiu io ŝanĝiĝas nun en via vivado, Ĉu vi ŝanĝas ion en via vivado ? Ĉu bona estas la ŝanĝo aŭ la  neŝanĝado ? Palpu bone, kaj iru antaŭen ?

Vi iradas iujn vojojn kaj tie vi ĉiam trovas oranĝojn. Se vi decidas trovi mangojn, ĉu vi iros samajn vojojn ? Vi nun vivas laŭ la modeloj de viaj gepatroj, antaŭuloj kaj vi vivas preskaŭ kiel ili riĉaj aŭ malriĉaj. Se vi volas fariĝi malriĉaj aŭ riĉai, ĉu vi daŭre vivu kiel ili ? Jes, ĉio ŝanĝiĝas en la naturo kaj al tiu ĉi daŭra ŝanĝiĝado ni devas alkonformiĝi.

Mi diru al ni ke mi emas riski ĉar la tuta vivo homa estas riskoza. Kiuj rekonas tion,  preskaŭ  ĉiuj  alfrontas kaj  venkas  ĉiajn vivepizodojn. Zamenhof spitis multajn vivperdajn situaciojn kaj nun ni havas Esperanton. Ĉu tiajn riskojn ankaŭ ni surprenas ? Vere ni ege hezitas, kaj ofte ni estas devigataj esti tro lojalaj, obeemaj kaj finfine surtretataj.

Inter 1990 kaj 1995 Hans BAKKER faris proponojn al la estraro de UEA por reformoj financaj. Tiam lin preskaŭ rekompencis abdiko fare de UEA-gvidantoj. Hans pasigis nur unu mandaton en la estraro de UEA kaj poste eliris. Li tamen daŭrigis sian agadon kaj nun kion oni rimarkas ? Rigardu ni

nun la financan baraktadon de UEA ! En 1999,  kiam mi rimarkis la altrudiĝon  kaj eĉ surtretadon de Osmo al UEA-estraranoj, kiujn li taskas nespertaj, mi tuj montris mian starpunkton malaproban kaj ĝis nun la pezo estas sur min kaj la lasta UKo de 2022 pruvas, ke la homo Osmo  ne jam ŝanĝiĝis. Kio nun okazas al mia Esperanto-agado ? Ne mi diru ion sed aliaj prijuĝu.

En 1905 okazis la unua kongreso de Esperantistoj, tiam nomata mondkongreso, kiam ne ekzistis UEA. Nun pluestas UKo, kaj UEA-gvidantoj respondecas pri tio ? Kion UKo alportis al Esperantistoj antaŭ 1934 kaj poste ?  kaj devis naskiĝi AKE Afrika Kongreso de Esperanto). Kial ĝi naskiĝis ?

La termino AKE (Afrika Kongreso de Esperanto) aperis la 14an de aprilo 2010 kiam naskiĝis UETA (Unuiĝo de Esperantistoj en la Tuta Afriko). AKE estas la kongreso de UETA, kiu ĝin donacis al la tuta mondo, ke ĉiuj rajtas organizi ĝin kun la sola kondiĉo, ke ĝi okazu en Afriko. Elpensintoj de AKE povus ne permesi tian uzon de la termino, sed ja facile ili faris tion. Ĉu io tia povus okazi ankaŭ por UKo. Vere ni bezonas profundan enmemiĝon por malkovri ion novan por nia vivado.

Kiam naskiĝis SAT, tiamaj UEA-gvidantoj estis malkontentaj. Sama okazis kiam aperis la Esperanta Civito. La naskiĝo de UETA estas alia krimo kontraŭ UEA laŭ ties gvidantoj eĉ afrikaj. Kial UEA-gvidantoj devis tiel konduti ? Eble la ĝermo estus en la rilato IEL (Internacia Esperanto-Ligo)  kaj UEA Feliĉe la nuna estraro ŝajne klopodas iel esti malfermita al ĉiuj tendencoj en la movado tamen EKO preskaŭ neniam akceptas aperigi raportojn pri agado de ACE en sia paĝaro. Ŝanĝiĝu pensmaniero kaj la jaro 2023 estu inaŭgura por tio.

Kiom utila estas nun UKo, AKE ? Ĉu oni povus pensi pri aliaj manieroj proksimigi Esperantistojn unu al la alia ? Ĉu ĉar okazas Amerika Kongreso de Esperanto kaj tial okazu ankaŭ afrika kongreso ? Ameriko kaj Afriko tute ne havas saman grundon. Tial  ĉiu faru tion, kio kongruas kun ĝia grundo. Ĉu tre utilas AKE (Afrika Kongreso de Esperanto) ? Ĉu iu povas diri la veran utilon de AKE al afrikaj esperantistoj ?

Kiam okazis UAK (Unua Afrika Kongreso) en 1990, tiam ekzistas multaj Esperanto-kluboj tra Afriko kaj ankaŭ funkciantaj landaj asocioj tre bone subtenataj de Hans BAKKER.  En tiu etoso okazis ankaŭ la dua Afrika

kongreso (DAK) en Benino, la tria (TAK) en Ganao kaj la kvara (KvAK) en Zimbabvo. De 2004 ĝis 2013 neniu alia afrika kongreso okazis. Ne pli frue

ol en 2013-2014  Mireille organizigis ion en Benino kun la nomo Afrika Kongreso. Tiam kiom da esperanto-kluboj partoprpenis  funkciantaj ? Kaj nun  en 2022 kiom da Esperanto-kluboj vere funkciantaj en Afriko kaj kiom da tiaj landaj asocioj. Klare videblas, ke preskaŭ nur unuopuloj zorgas pri la movado kaj kun kiu ideo ? Esperanto per si mem postulas kluban vivon, kaj tion Hans BAKKER emfazas en sia afrika agado, kion li transdonis al ACE (Afrika Centro Esperantista).

Korespondado kun Esperantistoj afrikaj povus ion diri al ni. Plejparto de afrikaj esperantistoj pensas, ke, necesas parkerigi kelkajn vortojn por peti kompenson ĉar oni konas la lingvon. Tiaj homoj instruas Esperanton kaj postulegas honorarion. Rigardu ! Kiom da afrikaj esperantistoj partoprenas esperantajn renkontiĝojn proprarimede ? Sanĝiĝo de pensmanieroj nepras.

UEA-gvidantoj estu malfemitaj al ĉiuj tendencoj de la Esperantujo ! Iom jam komenciĝis kun la estraro  2022-2025 de UEA. Gratulojn !

UEA-gvidantoj  kaj ties kunlaborantoj eksterafrikaj ne semu dividon inter Esperantistoj afrikaj ! Afrikaj esperantistoj klopodu kompreni, ke ne subfosante siajn samkontinentanojn antaŭ eksterafrikaj Esperanto-organizaĵoj, ili faras bonon al si mem kaj ankaŭ al la afrika movado. Tia ago malutilas ankaŭ kaj unuavice al la ago-farantoj mem. Afrikaj esperantistoj estu vere solidaraj. La nun afrika komisiono strebu al tio !

Estas nur unu AKE (Afrika Kongreso de Esperanto), termino, kiun elpensis UETA-fondintoj, kiuj ĝin donacis al la tuta mondo. Necesas scii kiom da tiaj kongresoj okazis en Afriko, ke homoj havu verajn informojn. Ne decas ke iuj afrikaj esperantistoj, respondeculoj pri la agado de UEA en Afriko, nomu iujn AKE-jn malveraj afrikaj kongresoj. Tiaj paŝoj dividas la esperantistojn en Afriko, kio ne profitos al la agado en Afriko kaj aparte al la ideo pri okazigo de UKo en Afriko. Laŭnombre la afrika kongreso de Senegalio estas la 10a en la organizado de tiaj kongresoj en Afriko. Afrikaj esperantistoj klopodu ke la venonta AKE estu la 11a ! Kaj ne nur tio. Necesas, ke bilanceto estu farita por kontroli ĉu nun afrikaj kongresoj estas utilaj al Afriko.

Afrikaj esperantistoj komprenu, ke ili devas mem prizorgi la movadon en Afriko tute serioze kaj tial ne persekutu  la paradizecaĵojn, kiujn ili pensas trovi ekster Afriko kaj tial iel agas kvazaŭ kontraŭ la afrika homa digno.

Afrikaj esperantistoj klopodu fari ion vere okulfrapan por Esperanto per la iomo, kiun ili disponas tute ne kalkulante pri eksteraj rimedoj aliulaj. Komencante iom post iom oni jam atingos iomegon.

TIETo (TIETTI-Instituto de Esperanto en Togolando) klopodu per sia alo ACE (Afrika Centro Esperantista) realigi sian planon pri perlaborado de Esperanto pere de EPI-IPE (Esperanto per Io, Io per Esperanto). Por atingi la celon, TIETo kalkulu pli je novaj esperantistoj ol je malnovaj, kiuj preskaŭ ne plu interesiĝas pri la movado pro kialoj nur de ili konataj.

Certe la nova jaro malfermigos tiajn okulojn al ĉiuj ke la tutmonda movado saltu pli alten ol antaŭe.

Sukceson !

GBEGLO Koffi

Administranto de ACE (Afrika Centro Esperantista)

## B- AGADORIENTIĜO

Ĉiu estulo klopodas siamaniere por plenumi sian taskon homan sur la tero. Observante la iradon de la diversaj agoj de la homoj, oni povas rimarketi ion. La agadoj sekvas du vojojn. La unua estas, ke la homoj agadas por gajni/profiti dum la dua montras, ke la homoj agadas por gajnigi/profitigi.

Memorante la sakrojn de Osmo BULLER dum estrara kunveno de la berlina UKo de 1999 mi havas la impreson ke klopdoj de tiu homo estas tiam pli orientita al li ol al la esperantistaro. Tiam, la estraranoj parolis pri la disdivido de la taskoj inter estraranoj kaj la ĝenerala direktoro. Li tiam diris kolere : « Mi ne akceptas, ke oni reduktu miajn povojn ».

Se memori iamajn asertojn de Hounsounou François en 2005 necesas, oni povus skribis liajn tiamajn vortojn : » Mi translokigis la afrikan oficejon de Togolando al Benino ». Oni povus sin demandi ĉu la neredukto de la povo de Osmo faros bonon al agado de UEA ? Kio pri la movoj de Afrika Oficejo de UEA de Benino ? La sekvo nun klarigas la aferojn, la neredukto de la povo de Osmo faris bonon ne al UEA sed al Osmo kiel ankaŭ la translokigado de AO fare de Hounsounou François de Togolando al Benino profitigis ne al la afrika agado sed al François. Kial ? Simple ĉar tiaj klopodoj odoras PRIORITATOn MI, per kiu la agantoj celas propran gloron. Ĉu iel esplori ankaŭ agadon de Renato CORSETTI ?

En la komencaj laboroj de GBEGLO Koffi kiel estrarano de UEA, li demandis Hans BAKKER, pri homoj, kiuj honeste kaj sindoneme kunlaboros kun li. Tuj Hans respondis , » Unualoke, estas Renato ». Jaroj pasis, kaj okazis ne kontentigaj aferoj sed Hans plurestis ĉe sia aserto ĝis sia morto pri la fakto, ke Renato direktas sian agadon pli al PRIORITATO ILI ol al PRORITATO NI. Tio ĉi signifas, ke Renato agadas, ke la aliaj homoj profitu de tio, jes, ke Esperanto disvastiĝu tra la mondo. Tion oni ja notas en ĉieesto lia preskaŭ nur por ke aliaj profitu el Esperanto-laboroj.  Oni do povus proponi du aksojn en agado de ĉiu homo.

**1- Agado por gajni ion**

Tie ĉi la homoj ĉiel klopodas, ke preskaŭ nur ili profitu el siaj diversaj agadoj. Eble, ankaŭ aliaj povos gajni en tio, sed la agantoj pli celas sin mem ol la ceterajn. Tio estas nomata PRIORITATO  MI. Tiaj ĉiel klopodas atingi sian celon eĉ subfosante, kalumniante, surtretante, batalante kontraŭ la aliaj, kiuj ne samopinias kun ili.

**2- Agado por gajnigi ion.**

Temas pri PRIORITATO NI. Devus esti PRIORITATO ILI, sed rimarkindas, ke en ĉiu agado la homoj senkonscie celetas sin  dum ilia preskaŭ alia parto de la agado estas direktita al la aliaj. Ĉu doni ekzemplojn pri tiuj aksoj ?

Supre estas menciita iama agado de Osmo BULLER kaj Hounsounou François en la akso PRIORITATO MI. Dum la UKo pasintjara, la reagoj de Osmo kaj Boris Mandirola por rifuzigi la C-komitatanecon al GBEGLO Koffi estas tia.  Ĉu ili konsideris la laborojn, kiujn la homo faros por la movado aŭ ili celis nur la homon, tiam aŭtomate konsiderante sin la plej bonaj homoj ? Ĉu mencii ion pri ankaŭ pri Jeremie necesus ?

Respondante mesaĝon pri Kampanjo Hans Bakker la 14an de julio 2021, Jeremie skribis : "Mi prenis en konsidero vian rekomendon kaj kontaktis Koffi,  sed li estis iom atentema kunlabori. Aliaj kiuj estis kontraŭ la politiko de la tiamaj gvidantoj de UEA, kaj kiuj fuĝis al civito nun tre bone kunlaboras.  Ni donu al Koffi iom da tempo kaj mi certas ke li plene kunlaboros, ĉar la AK estas malferma al ĉiuj  kiuj volas kunlabori..... , mi sentas ke vi havas preskaŭ saman opinion,  ke do sen Koffi nenio bona povas okazi en Afriko, se estas la kazo tio estos malrespekto kontraŭ afrikanoj". Kio scien-

das, tio estas, ke ĝis nun Jeremie neniam kontaktis s-ron Koffi pri kampanjo Hans BAKKER, kaj lia frazo "Aliaj kiuj estis kontraŭ la politiko de la tiamaj gvidantoj de UEA, kaj kiuj fuĝis al civito nun tre bone kunlaboras..... , mi sentas ke vi havas preskaŭ saman opinion, ke do sen Koffi nenio bona povas okazi en Afriko, se estas la kazo tio estos malrespekto kontraŭ afrikanoj"" montras, ke Jeremie iel amindumis al iuj ĉefuloj : ĉu PRIORITATO MI aŭ PRIORITATO NI ? Ĉiu juĝu. Aldonindas, ke tiuj cititaj frazoj tute ne estas kritiko al iu, sed nur montras kio okazis kaj por ke oni vidu ĉu temas pri PRIORITATO MI ; PRIORITATO NI aŭ io tute alia. Preskaŭ ĉiuj agadoj de afrikanoj estas por gajni kongreson, komplezon de eksterafrikaj esperantistoj. Ĉikampe oni (sen) konscie fariĝas marionetoj kaj tiel pensas per la kapoj de aliaj homoj. Ne, Esperantistoj laboru kiel Renato celante pli la bonon de la aliaj homoj ol propran.

Hans BAKKER agadis preskaŭ nur por la bono de aliaj homoj. Tion faras multaj aliaj esperantistoj tra la mondo : Zamenhof, Lanti, Umeda, Humphrey TONKIN, Ian FANTOM, Pasquale ZAPELLI, Kep ENDERBY, Peter ĈRDLE, ktp.

Kion oni povus rimarki, tio estas, ke la PRIORITATO MI estas en Afriko kaj aliaj triamondaj landoj, dum la PRIORITATO NI estas en la aliaj partoj de la mondo. Tamen jes ankaŭ homoj PRIORITATO NI troviĝas tie ĉi. Rekonindas la laboroj de la beninano TCHIKPE Privas, kiu uzas proprajn rimedojn por Esperanto. Tiajn oni povas trovi ankaŭ en Togolando malmultaj unu/du/tri sed inter tiuj estas ne nunaj zorgantoj pri agado de UEA en Afriko.

Kiam iu organizas Esperanto-renkontiĝon kaj poste tamtamadas sur tegmentoj ke oni vidu kion li faris kaj tial li meritas malpunon de UEA, ĉu tiu celas gajnigi aŭ gajni ? La esperantistoj devas tre bone analizi kion ili faras profite al Esperanto. La agado por gajnigi estas pli efika kaj rendimenta ol la agado por gajni. Starigante planon por ion okazigi Esperante, necesas, ke oni bone analizu la aferon, ke ĝi estu pli PRIORITATO NI ol PRORITATO MI, ĉar ĉiuj klopodoj por gajnigi estas pli honesta kaj efika ol ceteraj. Tiu ĉi teksto ne fermiĝu sen la mencio ke preskaŭ ĉiuj afrikaj kongresoj organizitaj kun la celo marĝenigi iujn afrikajn esperantistojn estas por gajni. Necesas bone pripensi tiajn agadojn en Afriko, ĉar eĥoj de la afrika

kongreso 2022 en Senegalio montras nekontentecon de afrikaj esperantistoj precipe de membroj de la afrika komisiono de UEA, kiujn la organizantoj de la kongreso ne kunlaborigis plurterene. Aliaj tiaj ne kontentaj afrikaj espe-

rantistoj estas malnovaj, kiuj nun distanciĝas de la movado eble pro la fakto, ke ilia politiko PRIORITATO MI ne sukcesis. Ĉu funda esplorado de la movado surbaze de tiuj du aksoj ne povus ebligi alimanieran metodon disvastigi Esperanton ?

**C- EPI-IPE (Esperanto Per Io - Io Per Esperanto)**

==================================================

**UNUA PARTO**

**FUNDAMENTO DE LA DISVASTIGO DE ESPERANTO FARE DE AFRIKA CENTRO ESPERANTISTA (A.C.E.)**

EPI-IPE estas la bazo de la disvastigo de Esperanto fare de Afrika Centro Esperantista (ACE). Kion signifas EPI-IPE kaj kio estas ĝia esenco ? Tio ĉi aperas en subaj vortoj.

**1- EPI - IPE**

**a) EPI**

EPI estas Esperanto Per Io. Tio ĉi signifas, ke oni lernu Esperanton per Io. La lernado de Esperanto baziĝu sur io jam ekzistanta. Se tiu Io ne ekzistas oni unue starigu ĝin, ĉar per ĝi oni allogas homojn al Esperanto. Lernejoj jam ekzistas ; do instruistoj-esperantistoj laborantaj en tiuj lernejoj povas lernigi Esperanton al la gelernantoj. Tiuj instruistoj devas unue proponi kromajn kursojn senpagaj al siaj gelernantoj pri sia fako, kaj aldone instrui Esperanton al ili. Plia ekzemplo estas preĝejoj, kies anoj esperantistoj povos proponi E-kursojn al la fideluloj. Same povas okazi ankaŭ en metiejoj, kie la ĉefo, esperantisto, disponigu kursojn al la gelernantoj. Ankaŭ ĉirkaŭ mondona projekto realigata de grupo, oni povas organizi E-kurson al la grupanoj. Dum la kunvenoj en tiuj diversaj grupoj okazu Esperanto-kursoj. Por atingi bonajn rezultojn en la instruado, estas rekomendinda pli rekta metodo ol gramatika, ĉar la instruisto baziĝu sur la vivon ĉirkaŭ li/ŝi dum la instrulaboroj. Kiam la gelernantoj iomete kapablas ion kompreni en Esperanto, ili lernu pri la Bulojna Deklaracio, kaj kiam temas pri afrikanoj, ili sciu ankaŭ pri la Deklaracio pri La Esenco de la Afrika Esperantismo. La libro LA FUNDAMENTO DE ESPERANTO kun la Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo estu utila. Jes, iuj tuj eksaltos, kiel interesigi homojn al la lernado,

kiam ili tute ne konas la valorojn de la lingvo. Pri tio ĉi aperos, baldaŭ, vortoj.

**b) IPE**

IPE estas Io Per Esperanto. Tio ĉi signifas, ke oni akiru Ion novan uzante Esperanton. Tiu ĉi IO NOVA povas esti Scioj, Laboroj, Mono, Kredo, ktp. Tion ĉi la esperantistoj akiru neniam almoze/trompe, sed honeste laborante/kondutante. Nun tute ne plu estas la tempo de la manaoj de la biblio, kiuj falis el ĉielo kaj la homoj kolektadis. Eĉ tiam oni laboregis antaŭ ol trovi vivtenon. Do, la novbakitaj esperantistoj devas, se ili volas, perlabori siajn sciojn Esperantajn. Tiujn ĉi sciojn ili povas uzi por lerni pri aliaj fakoj, daŭrigi studojn, fari kion ajn por propra evoluo ĉiam respektante sian homan dignon. Nur por tute pravaj kaj decaj celoj propraj al la medio en kiu oni estas, oni uzu Esperanton. Jes, ĉiam aperas la demando pri kiel interesigi la homojn al la lernado de la lingvo, kiun ili tute ne konas.

**2- Interesigi homojn al esperanto-lernado**

Tiu ĉi punkto estas tikla en la disvastigo de Esperanto. Kiam oni malbone informas pri la lingvo, tiam multaj komencantoj eĉ ĉiuj tuj forlasas la kurson jam ĉe la komenco. Por tiu ĉi etapo de la disvastigo de la lingvo, la instruisto devas unue esti tute ne hipokrita.

Ofte E-instruantoj, ĉefe en Afriko, mensogas al la homoj, ke por havi amikojn ili lernas Esperanton, kvankam en ilia kapo estas io tute alia. Tial necesas, ke ĉiu E-instruisto unue konu sin mem por ĉiam memorigi al si, kial li lernis kaj uzas Esperanton. La instruisto estu sincera al si por rekoni, kio altiris lin al Esperanto. Se la instruisto estas vere sincera al si mem, certe li trovos manierojn kaj rimedojn por kapti la atenton de la homoj al Esperanto kaj sekve Esperanton oni lernos facile. Se ekzemple iu lernas Esperanton en preĝejo kaj tio ebligis al li esti pli verva kredanto, tiu povas uzi tiun ĉi argumenton por interesigi samsortanojn al la lingvo. Ni enkapigu al ni mem, ke nia disvolviĝo homa estas ne nur materia. Estas necese ne forgesi la mensan disvolviĝon de la homo, kio ege influas la korpan disvolviĝon. Tial necesas, ke la instruisto unue bone konduku la informsesion, antaŭ ol ekinstrui Esperanton. Rimarkindas, ke tie ĉi neniu regulo estas donita por bone interesigi homojn al Esperanto. Certe, jena maksimo estas konata « Kio vi estas, tio parolas tiom forte, ke oni ne

aŭdas kion vi diras ». El tio, decas kompreni, ke oni devas unue vivi en tio, kion oni instruas. Jes, oni vere AMU kion oni instruas/priparolas/prezentas. La tuta persono de la parolanto odoru tion, kion li priparolas/prezentas. Nur tiel oni povas sukcesi altiri homojn al tio, kion ŝatas dividi kun la aliaj homoj. Nun kio farendas ?

Nun ek al la laboro instrua, kies unua etapo estas la sinkono. Tio ĉi tre gravas en nia laboro ĉiea, kaj sekve ankaŭ en Esperanto-aferoj. Ankaŭ la instrumetodo pli rektmetoda ol gramatika estas tre grava por ne forgesi ankaŭ atestilojn (nedevigajn). Ene de ACE estas rekomendataj la studoj pri la Esperanto-movado kaj ankaŭ laŭ la europa referencokadro.

**DUA PARTO**

La aplikado de Esperanto en la ĉiutaga vivo homa estas unu el la du aloj de la sistemo EPI-IPE de Afrika Centro Esperantista (ACE). Necesas nun emfazi unu el la aloj, kiu prioritatu en la Esperanto-agado, sed kiu nun estas preskaŭ preteratentata. Tio estas la ĉevaleto de ACE.

La ĝisnuna klopodaro de Esperantistoj celas pli la internon ol la eksternon de la movado. Kep ENDERBY, prezidanto de UEA de 1998 ĝis 2002, iam diris : »Ni devas el iri el nia niĉo ». Ni, esperantistoj devas eksporti nian Esperanton ekster Esperantujon. Kion farante ?

Niaj kongresoj, renkontiĝoj, seminarioj, ktp celas nur la internon de Esperantujo. Kion ni gajnos en tio por Esperanto ? Kial ne organizi renkontiĝojn, kiujn partoprenu ankaŭ ne-esperantistoj ? Kial ni ne uzu niajn liliputajn rimedojn por prizorgi esperantistojn, ke per Esperanto ili utilu al la tuta mondo, jes ne nur al Esperantujo ? Kial ni ne havu metion nur per Esperanto kaj per tiuj metioj disvastigu Esperanton ?

Esperanto-organizaĵoj havas rimedojn siajn eĉ se liliputajn. Antaŭ ol uzi tiujn rimedojn nur por Esperanto-aferoj ene de la Esperanto-movado, necesas unue turniĝi ankaŭ al la cetera mondo. Esperanto ekzistu ne nur por Esperantistoj, sed por la tuta mondo, kaj nunaj esperantistoj

tasku al si realigi tion.

Ĉiel, en la klopodaro nuna de ACE estas pliaj planoj rilate la aplikadon de Esperanto en ĉiuj sferoj de la homa vivo. Esperanto ne plu estas pro-

jekto lingva, sed jam vivanta lingvo, kiu estu uzata kiel la aliaj lingvoj vivantaj. ACE kunlaboros kun homoj/organizaĵoj Esperantaj aŭ ne-Esperantaj, ke per Esperanto esperantistoj atingu tion, kion aliaj atingas per la aliaj vivantaj lingvoj. Ĉar monakiro precipas en ĉiu agado homa, Esperanto vere ebligas akiri monon kaj igi homojn tre riĉaj, nur per konstanta laborado per ĝi. Nun ni cerbumu kaj trovu ĉiujn kampojn de tiu ĉi aplikado.

Hans BAKKER, kunfondinto de Afrika Centro Esperantista (ACE), ebligis al esperantistoj vivteni sin. Kiel li faradis, ĉu ĝuste tiel ankaŭ ACE faru nun ? Eble la tuja respondo ne estu simple JES aŭ NE. Kio gravas, tio estas, ke kion siatempe atingis Hans BAKKER, tion ankaŭ nun atingos liaj anstataŭantoj ene de ACE.

Jen kontaktoj :

GBEGLO Koffi

Administranto de ACE

AFRIKA CENTRO ESPERANTISTA (ACE)

11 BP. 48 Lome 11

Lome

TOGO

Rete : afrikacentro@hotmail.com, ace2006hb@gmail.com

uea-kodo : acex-e

# TR'AFRIK

=====================

## I- Raportoj kaj programo pri agado

=====================================

### 1- Raporto pri la agado de Afrika Centro Esperantista en 2022

---

**RAPORTO PRI LA AGADO DE AFRIKA CENTRO ESPERANTISTA (A.C.E) EN 2022**

En la jaro 2022 ACE diversmaniere agadis. Instruado, subteno de esperantistoj tra Afriko kaj eldonado de libroj precipis en ĝia agado.

**INFORMADO**

ACE ĉefe informis pri Esperanto en vacapaj forumoj. Ĝi povis dum la celebrado de la Zamenhoffesto 2022 kaj okazigo de la 29a TEK (Togolanda Esperanto-Kongreso) informi la loĝantojn de la urbo AGOEGAN pri Esperanto. Instruistoj de tiea liceo povis konatiĝi kun la lingvo.

**INSTRUADO**

Kursoj per Fereza metodo okazis ene de Instituto Zamenhof. AMO-Seminario okazis en aŭgusto 2022 kaj ACE-seminario en decembro 2022. La seminariojn partoprenis esperantistoj el Togolando, Benino kaj Ganao.

**UTILIGADO**

- Relanĉo de la laboroj de UETA

Klopodoj estis faritaj, ke nun UETA havas reprezentantojn en Togolando,



Ganao, Benino, DRKongolando Burundio kaj Tanzanio. Kvankam ili ne akurate rilatas kun ACE, tamen la homoj pretas daŭrigi la laborojn en 2023

- Redaktado de periodaĵoj

• Semo : ĝi temis pri DISVOLVIĜO DE LA HOMEGO. Ĝi aperis 3-foje en la jaro 2022



Zamenhoffesto 2022 en Togolando

- KomACE (Komunikoj de ACE) : ĝi en dek-du numeroj prezentas mallongajn komunikojn de ACE en la jaro
- HACE (Horizonto de Afrika Centro Esperantista): ĝi estas plena periodaĵo de ACE, kiu enhavas tekstojn pri tre diversaj temoj. Nur unu numero aperis en la jaro



Zamenhoffesto 2022 en Benino

• Krome, ACE redaktis ankaŭ periodaĵon alian. Ĝi estas ALVOKIDO kiu estas vekilo por la redaktantoj de la periodaĵo ALVOKO de UTE (Unuiĝo Togolanda por Esperanto)




- Kunorganizado de Esperanto-renkontiĝoj en kluboj kaj landaj asocioj

UTE okazigis sian 29an nacian kongreson per helpo de ACE.

- Kontribui en enspezaj entreprenoj: kudrejo de Omba, jutubaj kaj bredadaj aferoj de KJBEL en DRKongolando



ACE subvenciis la grupon KJBEL de Goma (DRKongolando) por havi bredejon. Finfine la grupo ŝanĝis la planon al kudrejo. Certe la jaro 2023 donos pli certajn informojn.

- Eldonado : libroj, KD, periodaĵoj

Eldoniĝis memorlibro pri Desire RABEVAZAHA, kaj ankaŭ pretiĝis manuskriptoj de la libroj TIEL MI AŬDIS, MIA KREDADO I kaj II, MO-




NEPIDEMIO. Certe en 2023 ili eldoniĝos.

Rekonindas, ke la programo 2022 de ACE ne tute plenumiĝis. La prizorgantoj de ACE klopodos, ke la agado en 2023 estu pli fruktoportaj.

## II- Programo por la jaro

==========================

**UNUA PARTO**

**A- AGADSTRATEGIO 2023 DE ACE (Afrika Centro Esperantista)**

Ekde  aŭgusto 2021 ACE alimaniere agadas. Ĝia dokumento EPI-IPE iel

aludas pri la uzado de Esperanto kiel la aliaj vivantaj lingvoj. Fine de la jaro 2022 ACE dissendis novjaran saluton kies titolo estas NI PENSU ALIMANIERE. Ĵus verkiĝis alia teksto de ACE kun la titolo AGADORIENTIĜO. Ekde nun la laboroj de ACE baziĝas sur tiuj dokumentoj kaj aliaj novaj kiuj povos aperi ĉiam en la linio de alimaniera agado. Ne plu estas la momento preskaŭ nur celebri tagojn, organizi kongresojn, sen konkretaj agadoj por la disvastigo kaj utiligado de Esperanto. Estu for la tempo de « PRIORITATO MI », kiu estas en preskaŭ ĉiuj grupoj kaj unuopuloj. ACE agadas nun novstrategie.

## I_LERNI FARANTE kaj FARI LERNANTE

Ne plu estu tempo por informi kaj alia por lerni kaj utiligi. Ĉiuj agadoj havu samtempe ĉiujn tri rubrikojn.

Kiam iu devas organizi kurson, tuj oni pensu pri al kio la kurso utilos kaj samtempe oni utiligu la lernitaĵojn por tuj fari ion. Kiam oni uzas Esperanton, tuj oni plulernu ĝin kaj utiligu. Ĉio okazu samtempe.

ACE rilatos kun esperantistoj tra la mondo por kunlabori kaj kunhelpi ĉiam baziĝante sur siajn principojn supre menciitajn.

## II_SUBTENADO DE ESPERANTISTOJ

La subtenado de ACE baziĝos sur kluba vivo, ĉar la uzado de Esperanto okazu pli en grupo ol en unuopula agado kiu estas preskaŭ nur « PRIORITATO MI ».

La subtenado de ACE iras al ĉiuj. Tial interesiĝantoj adresos siajn petojn al ACE kun mencio de la nomo de la klubo, listo de membroj kaj estraranoj kaj laborplano de la jaro. La subteno de ACE iros unuarange al grupoj kun planoj kongruantaj kun PRIORITATO NI.

ACE povos rilati kun unuopuloj en la plulernado de/per Esperanto.

## III REDAKTADO/ELDONADO

En la jaro ACE organizos formadon de Esperantistoj en redaktado kaj eldonado de verkoj. Verkado en grupo de artikoloj por diversaj periodaĵoj estas ne ekstertema. ACE tiucele rilatos kun esperantistoj tra la mondo por lerni kaj lernigi.

**IV AGNOSKO DE LABOROJ DE ESPERANTISTOJ**

Homoj tra la mondo vere dediĉas sin preskaŭ tute al Esperanto. ACE taskas al si disponigi distingilojn al iuj el tiuj homoj. Dum premioj havos nomojn de esperantistoj, aliaj esperantistoj precipe afrikaj havos tiujn premiojn pro laboroj faritaj. ACE disponigas almenaŭ 100 eurojn por ĉiu premiito. La diversaj premioj estas :

i- Premio Hans BAKKER

Ĝi celas afrikajn esperantistojn plej aktivajn en la instruado de Esperanto en la jaro.

**ii- Premio Renato CORSETTI**

Renato CORSETTI estas dumviva zorganto pri regiona agado. Tial la pre-mion ricevos la esperantogrupo ĉefe landa asocio aŭ klubo, kies agado elstaris inter la aliaj en la jaro.

**iii- Premio Giorgio SILFER**

Giorgio SILFER estas tre talenta Esperantisto ege diligenta. Necesas rekoni tion de li tre admirinda. La premio celas esperantistojn-verkistojn .

**iv- Premio Hemmo TIETTI**

Jam estas premio Hemmo TIETTI por aktiva esperantisto, kiu tre bone scias ion pri TIETTI-Instituto de Esperanto en Togolando. Povos eĉ esti konkurso por tio kaj oni respondos demandojn rilate TIETon.

Regularoj pri la premioj baldaŭ aperos.

**V- ACE kaj UETA**

En tiu ĉi jaro 2023 ACE plurolu kiel sidejo de UETA, helpante ĝin realigi sian planon por la jaro.

**VI- Prizorgantaro de ACE**

i- Administranto : GBEGLO Koffi

ii- Helpantoj :

- DOUMEGNON Koffi
- SAGBADJELOU Kokou
- ATTIOGBE-AGBEMADON B. Mensah
- GBEGLO Dzifa
- aliaj helpantoj aperos en la jaro

**DUA PARTO**

**PROGRAMO DE AFRIKA CENTRO ESPERANTISTA (A.C.E) EN 2023**

Kion ACE povos realigi en la jaro 2023 ? Io estas realigata sed kun la nova strategio de ACE

**INFORMADO**

Temos pri informoj al Esperantistoj pri la Esperanto-movado. Konoj pri deklaracio de Bulonjo-organizaĵoj Esperanto-instru-metodoj, ktp.

**INSTRUADO**

Estos diversaj kursoj :

- kursoj por komencantoj (kurso FEREZ kaj aliaj)
- kurso por progresantoj (por la praktikantoj)
- korektado de leteroj
- kunverkado de tekstoj pri diversaj temoj koncerne afrikajn kulturaĵojn
- organizado de seminario pri diversaj temoj lingvaj kaj eksterlingvaj
- laŭgrada enkondukado de diversaj Esperanto-ekzamenoj internaciaj aŭ primovada

**UTILIGADO**

- veko de Esperantistoj/Esperanto-grupoj
- Pluiro de la relanĉo de la laboroj de UETA

La klopodoj koncernos plu Togolandon, Burundion, DRKongolandon, Kamerunion, Tanzanion, Beninon, Kotdivuaron, kaj aliajn landojn vekeblajn en la jaro, ktp

- redaktado de periodaĵoj

• semo : ĝi temos pri DISVOLVIĜO DE LA HOMECO, Vivejo (Koucado, kaj ĉio alia rilate la homan vivadon)

• KomACE (Komunikoj de ACE) : ĝi prezentos mallongajn komunikojn de ACE

• HACE (Horizonto de Afrika Centro Esperantista) : ĝi estas plena periodaĵo de ACE, kiu enhavas tekstojn pri tre diversaj temoj.

- Kunverkado por periodaĵoj internaciaj de artikoloj pri diversaj afrikaj kulturaĵoj
- Kunorganizado de Esperanto-renkontiĝoj en kluboj kaj landaj asocioj
- Kontribui en enspezaj enptreprenoj
- Eldonado : libroj, KD, periodaĵoj
- Agado en retaj forumoj per la uzado de JUTUBO kaj similaj retiloj
- Seminario pri UETA
- ktp

**2- Raportoj pri agado tra Afriko**

==================================

ACE povis rilati kun esperantistoj afrikaj pri la agado en 2022. Jen aperis diversaj informoj pri tiuj movoj.

**i- Zamenhoftago-festo**

---------------------

La subvenciado por ZAMENHOFTago-Festo atingis jenajn landojn:

- Benino : s-roj ABALLO Guy kaj EZIN Mechak
- DRKongolando : OMBA Alexandrine, Pastoro BUKURU, RAMAZANI Amissoi Nanjira, Birindwa Muŝosi kaj Verda Flago
- Togolando : UTE (Unuiĝo Togolanda por Esperanto)

Raportis pri la festo jenaj personoj/kluboj : OMBA Alexandrine kaj Verda Flago disponigis siajn raportojn vortajn kaj financajn, Pastoro Bukuru

disponigis nur fotojn, ABALLO guy nur tekston pri la prelego dum la festo kaj UTE nur la financan raporton. Ramazani skribis, ke li okazigis ion, sed ne disponigis raporton. Leteroj de Birindwa kaj EZIN Mechak montras, ke ili ne okazigis la feston.

**ii- Agado en unuopaj landoj**

**---------------------------**

Pri la agado en 2022, ACE rilatis kun esperantistoj kaj grupoj en Afriko.

- DRKongolando : DKEA, Espoir Kasati Ngoma, KJBEL (Goma)
- Togolando : UTE por la 29a TEK (Togolanda Esperanto-Kongreso

Pri raporto al ACE, menciindas, ke nur UTE povis disponigi raporton, la financan.




## LERNOKAMPO

==========

## VORTORDO EN ESPERANTO

En Esperanto, la loko de la vortoj en la frazo preskaŭ ne gravas. Kie ajn frazvorto estas la signifo de la tuta frazo preskaŭ ne ŝanĝiĝas.

Ekzemple :

- Mi estas lernanto
- Lernanto estas mi
- Mi lernanto estas.
- Estas lernanto mi
- Estas mi lernanto.

Ĉu tamen la signifo estas iom ne sama ? Klarigu.

**Rimarko:**

Oni atentu la lokon de kelkaj vortoj en frazo.

Vidu jenajn frazojn :

- Ankaŭ mi manĝas (a) : Mi ankaŭ manĝas (b).

Kvankam estas samaj vortoj en la frazoj, iliaj signifoj estas ne samaj.

(a) montras, ke iu manĝas, kaj aldoniĝas mi.

(b) montras, ke mi faras alian agon kaj aldone manĝas.

Aliaj vortoj tiaj estas : NE, NUR, EĈ, ALMENAŬ

Ekzerco :

Faru frazojn uzante ĉiun el tiuj verboj kaj klarigu la diferencon inter la frazoj

Ekzemple : (a)Mi Manĝas nur panon ; (b) Nur mi manĝas panon.

Ĉu (a) kaj (b) havas saman signifon ?

**KOUĈEJO**

=========

1- Pripensu ni

Farmisto kun la nomo Dekao havas nur unu maizgrenon kaj tiam ege malĝojis. Li sentis sin tre malfeliĉa, ĉar ne sciis kiel li povas vivi nur per tiu ĉi greno. Li tiam devis alparoli ĉiun homon kiun li renkontas. Iu donis al li manĝon dum aliaj mokis lin. Tiu sceno daŭris longe kiam iutage li renkontis viron kun la nomo Ĉio-en-vi. Jen okazis io tute alia

Kiam Dekao ekrakontis sian historion al Ĉio-en-vi, tuj tiu ĉi reagis. "Ho bonege, vi estas tre riĉa homo. Kial vi plendas nun ? Semu la maizgrenon kaj vi vidos poste kio okazos". La homo iris kaj semis la maizgrenon. Pasis pli ol dek jaroj, la homo kaj la viron neniam plu renkontiĝis, kaj hazarde, iam, miraklo okazis.

Dekao sidis apud sia granda grenejo kiam pasis Ĉio-en-vi. Neniu unuavide rekonis la alian. Kiam Ĉio-en-vi estis admiranta la formon de la maizspikoj en la grenejo de Dekao, jen tiu ĉi alproksimiĝis kaj rakontis ĉion pri kiel li povis akiri la grenejon kaj kiel li planas havi pliajn pro simpla afero, kiun viro memorigis al li. Ĉio-en-vi tiam tuj memoris, sed tute nenion diris por montri, ke li estas la viro. Dekao parolis al Ĉio-en-vi pri ĉio, kion li produktas el la maizfaruno, kiel li faras kutime al ĉiuj aliaj homoj kiuj vizitas lian grenejon. Kiam Ĉio-en-vi estis foriranta, Dekao ne povis malhelpi sin doni al li trinkaĵon faritan el maizo, kiun trinkaĵon Ĉio-en-vi neniam antaŭe fabrikis en sia vivo. Li tre ŝatis la trinkaĵon kaj reveninte hejmen, tuj provis prepari la trinkaĵon kaj sukcesis.

Inter Dekao kaj Ĉio-en-vi, kiuj helpas/kapabligas/trejnas/konsilas/ktp. la alian ? Pripensinda afero.

**2- Rimarku ni**

Ĉio-en-vi diris ion al Dekao. Tiu ĉi bone konas tion, sed forgesis, ke tiu ĉi unu maizgreno povos iam fariĝi tuta grenejo. Li do faris tion, kion Ĉio-en-vi memorigis al li, kaj jen la rezulto.

Ĉio-en-vi scias pri la trinkaĵo el maizgrenaro sed forgesis tion fari, sed rakontoj de Dekao memorigis tion al li kaj jen li havas propran trinkaĵon.

Kio okazis inter Dekao kaj Ĉio-en-vi, tio estas neniom krom tio kion oni nomas COAĈING nun en angla, franca kaj ktpa lingvoj.

Vidu kiel tiu ĉi maizgreno povis fariĝi tuta grenejo. Ĉu iu instruis al la maizgreno fariĝi tia ? Tute ne : Ĉio jam estas en la maizgreno, kiu metite en taŭgajn kondiĉojn, fariĝis ĉio, kio estas en ĝi.

Tia estas ankaŭ ĉiu homo. Ĉio estas en la homo, kaj simpla konversacio ebligas al la homo konsciiĝi pri ĉio en ĝi kaj agante, atingas multon, kiun iuj povas nomi miraklo.

Nun kiun vorton uzi en Esperanto por traduki COAĈING.

Ĉio-en-vi lernigis nenion al Dekao. Temas pri simpla afero, kiu jam estas en Dekao, kaj kiun Ĉio-en-vi memorigis. Jen Ĉio-en-vi estas COAĈ kaj kion li faris estas COAĈING. Fenomeno lingva nomata PRUNT-vorto aŭ Vort-enmigrado povus naski KOUĈ- por COAĈ kaj KOUĈ-ADO por COAĈING. Jen aperas la verbo KOUĈ-i, simile kiel TAJLOR-i; MASTR-i, MAJSTR-i, DIREKTOR-i, PROFESOR-i, ktp.

Ĉio-en-vi kouĉis Dekaon, ĉar liaj vortoj ebligis al Dekao atingi grandajn rezultojn per propraj fortoj. Dekao estas la kouĉato, dum, Ĉio-en-vi, la kouĉanto. Dum la konversacio inter Dekao kaj Ĉio-en-vi, ankaŭ tiu ĉi akiris ion novan, memorigon pri produktado de trinkaĵo el maizgreno.

KOUĈo estas do tiu homo, per kies vortoj oni povas memorigi ĉiujn kapablojn/fortojn, kiujn oni havas kaj utiligi ilin por atingi ĉion eksterordinaran, kion oni antaŭen ne atingis.

**3- Rolo de tiu ĉi rubriko KOUĈEJO**

En tiu ĉi rubriko aperos vortoj de ĈIO-EN-VI kaj ĉiu leganto pripensos ilin por vekiĝi kaj fari ion, pri kio li poste rakontos ke ĈIO-EN-VI kaj ankaŭ aliaj homoj utiligu por memori ion, kio estas en ili sed pri kiuj ili antaŭe ne konsciis kaj kion ili uzas nun por atingi multon eksterordinaran kiun ili antaŭe ne atingis.

**VIDPUNKTOJ**

=============

**1- KOGNOVOJOJ**

La homo naskiĝas, kreskas kaj finfine iam malaperas. Dum tiu ĉi migrado ĝin eniras multe da aferoj diversaj, sur kiuj ĝi baziĝas por evolui.

Certe tiujn aferojn ĝi akiras per lernado ĉia kaj ĉiela. Kiom da vojoj proponiĝas al tiu ĉi lernado, per kiu la homo kognas. Necesas scii kiom da vojoj kaj vidi kiu el li pli efikas.

## II- VOJOJ AL KOGNADO

« La homo lernas de antaŭ sia naskiĝo ĝis post sia morto ». Se tio estas vera, tuj aperas, ke la lernado okazas ne nur per libroj. Tuj aperas du vojoj al kognado :

1- Perlibra lernado

2- Viveja lernado

## III- PERLIBRA LERNADO

Tute klaras, ke oni legas aferojn en libroj kaj ilin enkapigas. Tiujn lernitaĵojn oni uzas por gvidi sin dum la vivado. Oni jam povas aŭtodidakte lerni aŭ lerni en lernejoj.

La lernado en lernejoj okazas laŭ difinitaj programoj dum tiu en-lerneja povos trafi tre diversajn kampojn.

Lernejoj ekzistaj diversaj : de la infanvartejo ĝis la altlernejoj. Studoj koncernas diversajn kampojn kaj homoj povas specialiĝi en almenaŭ unu el ili doktoriĝante. Kiu doktoriĝis pri historiro, tiuj ne aŭtomate spertas pri matematiko. Por iĝi tia, oni devas ankaŭ lerni matematikon ĝis tiu grado.

Kio konendas tie ĉi, tio estas, ke en lernejoj oni havas fiksajn programojn aŭ kampojn kiujn oni nepre sekvu. Ĉio klaras, ke lernado perlibra ne garantias liberan kognadon pri preskaŭ ĉiuj kampoj. Ĉu alia kognovojo ekzistas tia ?

## IV- VIVEJA LERNADO

Kie oni vivas, tie oni ankaŭ lernas. La lernado okazas en necesejo, manĝejo, kuŝejo, ludejo, preĝejo, fetiĉejo, naĝejo, ktp. Ĉie en la universo kie la homoj estas, tie ili lernas. Jes, ili lernas de ĉio : bestoj, mineraloj, akvoj, aero, jes de ĉio, kaj ankaŭ pri ĉio

La viveja lernejo havas nek fiksan programon kej fiksan metodon kaj ĝi okazas ĉie/ĉiam/ĉiel ajn. Ĝi okazas ankaŭ en lernejoj, do ankaŭ per libroj, kvankam libroj tute ne estas la necesaj iloj. El tio oni povas diveni ke perlibra lernado estas parto de viveja lernado.

Le metodo uzata en viveja lernado estas natura irado de la aferoj. Oni lernas de ĉio kaj de nenio kaj oni lernas ĉion kaj nenion uzante ĉiajn kaj neniajn librojn, metodojn, programojn, ktp.

## V- RILATOJ INTER PERLIBRA KAJ VIVEJA LERNADO

La unua afero notinda en perlibra lernado estas diplomo. Ĉu estus koincido ? Libroj estas el paperoj kaj jen ankaŭ la diplomoj estas el paperoj. Ĉar preskaŭ ne estas devige uzi librojn en viveja lernado, jen tie ĉi oni tute ne parolas pri diplomoj.

La lernado laŭ viveja vojo estas preskaŭ ludeca kaj oni lernas nesciante ke oni lernas. Oni nenion altrudas al la gelernantoj, kiuj samtempe estas geinstruistoj. Ĉiuj lernas de ĉiuj.

Ofte, en multaj landoj precipe franclingvaj, oni tiom alkroĉiĝas al diplomoj, ke oni uzas eĉ ne decajn vojojn por havi diplomojn tute ne havante la tiucelajn sciojn. Tio tuj montras, ke la viveja lernado estas pli grava ol la perlibra.

Homoj tiom alkroĉiĝas al la diplomoj, ke kiam ili havas unu superan al aliaj, ili montras sin superaj al aliaj homoj. Kion oni ofte rimarkas, tio estas, ke homoj kun superaj diplomoj ricevas altan oficon, dum aliaj sen diplomoj estas subuloj. La realeco estas, ke la verajn laborojn faras la subuloj per la manoj dum, la altoficuloj preskaŭ nur per la buŝoj laboras uzatante nur vortegojn por esprimi eĉ tre simplajn aferojn.

## VI- KONKLUDO

La perlibra lernado ofte koncernas nur unu fakon kaj la diplomintoj malfacile plulernas, ĉar kiu doktotiĝis kaj perlaboras sian diplomon ofte tiuj preskaŭ ne plulernas ĉar konsiderante sin ĉe la supro de la socitavolo. Male, kiuj uzas la vivlernejan vojon, tiuj lernas de antaŭ la naskiĝo, ĝis post la morto. Aperas, ke tiu ĉi ĉiam adaptiĝas al ĉio en la evoluado de la mondo, ĉar ili ĉiam lernas de ĉio.

Oni ĉiam memoru la celon de ĉiu lernado : oni lernas por la vivo. Tio precipu en ĉiuj homagadoj. La diplomoj valoras nenion se oni ne kapablas apliki la sciojn akiritajn. Preferindas tre bone enprofundiĝi en la verajn sciojn kiujn oni vere mastru por ilia utiligado cele al la unuigo de la mondo. Tial la viveja lernado ĉiam estu kun ĉiuj eĉ kiam oni havas la plej altajn diplomojn de la mondo.

**FELIETONE**

=========

**MIA KREDADO**

"Religiaj aferoj devas esti fonto ne de diskordoj, sed de konkordo."

GBEGLO Koffi

**ENKONDUKO**

Mia skeptikeco estas nun multjara. Mi delonge interesiĝas pri religiaj aferoj, sed ĉiam mi rimarkas, ke la vojo irata ne estas la plej taŭga.

Mi komencis kiel pagano, kaj helpe de multaj libroj, kiujn mi ne ĉiam konsideras fidindaj, mi sukcesis informiĝi pri la ĉefaj religioj de la

mondo. Mi nenion komprenis, tamen, iam iu ideo venis en mian kapon: la ununureco de Dio, do de religio kaj kiel mi rilatu kun tiu Principo vivdona.

En mia lando multaj kristanoj polemikas. Iuj diras, ke ilia kredado estas la vera, dum la aliaj sin konsideras la veraj diuloj. Ne ! Ni ne polemiku pri kaj pro religiaj aferoj. Dio estas la Fonto de Senfina Amo. Li estas ne postulema, sed tre fidela, pardonema, saĝa, ktp. Lia sola deziro estas, ke ni praktiku tiun Amon, kies fonto Li estas. Ĉiuj profetoj kaj pensuloj tion rimarkis kaj rimarkas. La vojo malfermita al ni estas koni nin mem, la aliulojn, praktiki Dian Amon.

Do en tiu ĉi verko temas pri propra aventuro en religia tereno. Miaj spertoj dum mia infanaĝo ĝis nun estas iel rakontitaj. Poste aldoniĝis punktoj pri la ĉefaj religioj de la mondo. Fine skiziĝis la opinio de mi pri RELIGIO kaj Dio kaj kiel Lin adori.

Mi ne miras pri noviceco. Mi antaŭdankas tiujn, kiuj sendos al mi siajn kritikojn, konsilojn kaj rimarkojn pri miaj senspertaĵoj.

Lomé, la 18an de aprilo 1990

**UNUA ĈAPITRO**

Kiam miaj okuloj malfermiĝis, mi rimarkis, ke mi havis du protektantojn. La viron mi vokis per Papa kaj la virinon Dadavi. Ekzistis aliaj personoj antaŭ mi, miaj gefratoj, kaj post mi, mi rimarkis, ke estis bebo en la manoj de Dadavi. Kune, kun ĉi tiuj mi kredis, ke Paĉjo estas ĉielpotenca.

La loĝejo de Papa estis je ĉirkaŭ duonkilometro for de tiu de Panjo. Tiu promenado de Papa al Dadavi okazis multfoje dum la tago. Antaŭ la domoj de preskaŭ ĉiuj vilaĝanoj troviĝis statuecaj bildoj el argilkoto. Cciuj homsimilaĵoj estis por mi granda spektaklo, kaj mi ĉiam terenfalis pri miaj gapadoj.

La statuoj en la domo de mia patrino estis multaj, sed nenio tia ekzistis ĉe Papa, en kies ĉambro troviĝis tri amasoj da kolaonuksoj. Mi memoras, ke ĉiumatene, kiam mi iris de Panjo al Paĉjo, li ĉiam sidis apud la tri amasoj, flustrante ion. Tion mi neniam komprenis, tamen mi

iel enkapigis tiun parolon, per kiu mi povis mistifiki samaĝulojn tiamajn. Mia infanaĝo tiel okazis en pagana familio. Mia patrino gardis la paganaĵojn de sia mortinta patro, dum Papa havis propran kolaofetiĉon kaj aliajn fetiĉaĵojn.

Pagana vilaĝo, kie mi vivis. Multaj fetiĉoj tie estis. La ĉefa estis HEBIESO, kiu famigas la vilaĝon. Ĉiusabate, posttagmeze, tamtamado ĉie aŭdiĝis: la vilaĝanoj ludas al siaj fetiĉoj kaj tie ne mankas manĝaĵoj kaj trinkaĵoj oferitaj al fetiĉoj. Tiu impona spektaklo altiras al si junulojn kaj infanojn. Dancado de fetiĉanoj, disdonado de drinkaĵoj, prononco de mistikaj vortoj agrabligas la etoson. Kaj kial tiuj ceremonioj?

Mi nenion komprenis, sed ĉiam ĉeestis, ĉar ne mankis tie io povanta helpi min plenigi stomakon. Mi tamen tiam rimarkis, ke en la fetiĉejoj loĝis multaj personoj, malsanuloj, mizeruloj, ktp. Mia patro iam klarigis al mi, ke ĉiuj deziras plibonigon de sia vivo, kion la fetiĉoj kapablas fari. Ŝajne la fetiĉoj utiligas siajn potencojn por savi homojn, respondi favore iliajn petojn. Dum la ĉiusabata ceremonio, homoj venadis el multaj vilaĝoj kaj urboj najbaraj, eĉ foraj, por oferi ion al la fetiĉoj, dankante ilin. Kio ajn okazas al la vilaĝano aŭ al iu alia, kiu scias pri la fetiĉoj de tiu vilaĝo, la bezonulo devas sin turni al la fetiĉestro por peti favoron. Tiaj personoj ĉiam venis ankaŭ en la domon de Papa, kiu tre spertiĝis pri siaj feliĉaĵoj.

Iom post iom mia aĝo multiĝis kaj miaj okuloj pli kaj pli klare ekvidis. Paĉjo metis fingroringon al mia ringofingro, la samon li faris al miaj gefratoj. Per tiuj ringoj oni povis rekoni nin adeptoj de kolaofetiĉo. Mi ne sukcesis permesi al mi observi la tabuojn; la ĉefa temis pri nemanĝado de porkaĵo. Malgraŭ tiu misobeo mia, nenio malbona trafis min. Tamen mi multfoje aŭdis Paĉjon admonanta homojn pri tiu tabuo. Mi primemoras, ke iam, kiam oni venigis al li malsanulon, li klarigis, ke ĉi tiu ne observis la tabuon. Tiam li faris ceremonion, dum kiu li sanktigis akvon. Trinkinte tiun akvon, la malsanulo tuj resaniĝis. Ĉu miraklo? Surbaze de tio Paĉjo plukonsilis pri la observo de la leĝoj fetiĉaj, je kiuj mi ĉiam restis surda. Kial min ne trafis malsano pro mia obstineco? Mi tiam komprenis, ke la fetiĉo estas indulga.

Mia patro multfoje rakontis al mi la farojn de fetiĉoj: mortigon, malsaniĝon, malfeliĉigon pro malobeo je la fetiĉaj leĝoj. Verdire mia sesjareco ŝtopis al mi la orelojn, ĉar mi estis surda je la diroj paĉjaj. Mi ĉiam faris la malon, sed la fetiĉoj ne reagis. Tiu sesjareco ne nur ŝtopis al mi la orelojn, sed ankaŭ instigis mian onklon sendi min en la unuan klason de la elementa lernejo katolika, la unusola tiam en nia vilaĝo.

**(daŭrigo en la venonta numero)**

**VERDAJ PLUMOJ**

=============

**1- La fiŝisto**

Fiŝisto vivis en vilaĝo.

Iam li iris al la rivero por fiŝkaptado.

Antaŭ ol atingi la riveron, li grimpis sur montaron por atingi sian laborejon.

Li ŝategis sian laboron, ĉar per ĝi li akiris monon por prizorgi sian familion.

En la vilaĝo li vivis kun sia edzino kaj knabeto en la kabano.

Kiam li kaptis fiŝojn, li metis ilin en saketon kiun li ligis ĉirkaŭ la kokso.

Kaptinte fiŝojn, li reiris kaj donis ilin al sia edzino kiu iris vendi ilin en la vilaĝo.

Ofte li vekiĝis frumatene ĉar tiam estas favora tempo por kapti fiŝojn.

Antaŭ ol grimpi la monton kaj atingi la riveron, li kriis laŭte por aŭdi la reagon de siaj kunlaborantoj kaj certiĝi ke nenio malbona okazas.

Ankaŭ liaj kunlaborantoj faris same. Tial kiam fiŝisto atingas la riveron li ĉiam atentas la krion de siaj kunlaborantoj por respondi, kio estas signo ke iuj jam ĉeestas.

Neatendite, la fiŝisto kiu vivis kun sia familio, tre kaj tre malsaniĝis, ĝis li ne estis kapabla iri al la rivero por fiŝkapti, kvankam sen tiu laboro estis tre malfacile al lia familio vivi.

Lia edzino serĉadis medikamentojn sed vane. Ŝi tute ne sciis kion fari plu por savi la edzon. Pli akriĝis la malsano de la edzo ĝis eĉ paroli li ne plu povis.

Lia foresto tiom longe daŭris, ke aliaj fiŝistoj nenion plu komprenis. Ĉiuj pensis, ke io grava okazas al sia kunlaboranto.

Dum tiu tempo de malsaniĝo de la viro, la edzino ĉiel klopodis por zorgi pri la familio. Tial la filo de la familio decidis ion fari kaj tiam li iradis al la kampo por zorgi pri la bestoj bredataj de la patro. Tie la knabeto estis maltrankvila pro la malsano de sia patro. Jen ankaŭ li klopodis trovi medikamentojn naturajn por provi resanigi sian patron.

Bedaŭrinde ĉiuj medikamentoj restis ne efikaj al la malsano.

La fileto ĉiam iradis al kampo pro la bestoj. Ĉiam li pensadis pri la resaniĝo de sia patro. Iam, surkampe, li sidis sub arbo kaj pripensis tion, kion li fine faru por la resaniĝo de sia patro.

Longtempe li pensadis pri tio, kion same ankaŭ lia patrino faris.

La edzino devis decidi iri al fiŝkaptejo por fiŝkapti. Ŝi kunportis fisĥokojn de sia edzo. Alveninte al la rivero, ŝi ĵetis la fisĥokon en ĝin, kaj bedaŭrinde eltiris fiŝeton. Tiu ĉi tuj ekparolis :” Pardonu, mi petas vin, bonvolu liberigi min el la hoko kaj reen meti min en la riveron, ĉar mi estas ankoraŭ eta ; atendu ĝis mia plenkresko, kaj tiam mi estos jam preta por esti manĝinda kaj vi revenos por preni min”. La reago de la virino estis tuja :” bonŝance vin mi kaptis, ĉar laŭ diroj de la plej maljuna homo en nia vilaĝo, neniu medikamento kaj nenio alia krom karno de eta fiŝo resanigos mian edzon nun tre malsanan. Do mi ne povas reĵeti vin en la akvon ĉar mi bezonas la resaniĝon de mia edzo.

Ŝi reiris kaj preparis kiel oni diris al ŝi kaj jen la edzo resaniĝis kaj la ĝojo revenis en la familion.

**Jeandedieu KIKAKO**

## 2- EN MIA VILAĜO

Naskiĝis mi en tre trankvila vilaĝo en kiu regis granda harmonio.

Kutime, kiam atingas vespero ni ĉiuj ĉirkaŭas la fajro kun familianoj kaj najbaroj, la geavoj rakontis al ni historiojn kaj instruis al ni nian kulturon . La ĉefaj aktivecoj de ĉiuj vilaĝanoj estis kulturado de teron, bredado de bestoj kaj la fabrikado de lokaj drinkaĵoj, sed por mia familio la ĉefa aktiveco estis kulturi la teron. Kutime, mia patrino kiu nomiĝis Margareto ĉiam diris al mi : ‘’ Filo mia, neniam neglektu aliajn pro iliaj rasoj, triboj , vivniveloj , vivkondiĉoj ktp ĉar la futuro rezervas al ni multon ‘’. Mi tiam ne komprenis kial ŝi ŝatas tiun proverbon.

Du jarojn poste, ribeluloj eniris en nia vilaĝon kaj bruligis domojn, mortigis junulojn kaj avojn, seksperfotis virinojn kaj antaŭ miaj okuloj, unu el tiuj ribeloj kiu mantenis maĉeton kaj sin pretigis por apartigi la brakojn kaj la kapon disde la trunko de mia patrino, pendigis mian patron kaj por bruligi la bibliotekojn de la vilaĝo por ke perdigu ĝia historio, ili metis ĉiujn geavojn en unu domo kaj poste, ili bruligis la domon

en kiu estis ĉiuj avoj . Post tiuj masakroj, nur kvin personoj en la tuta vilaĝo inkluzive de mi kun mia malplej aĝa fratino kiuj ne mortis sed ni ankaŭ devis iri kun tiuj ribeluloj. Kiam ni atingis meze de la arbaro, du personoj el ni rifuzis iri kun tiuj ribeloj ĉar la vojo estis jam longa kaj tiuj ribeloj senhezite fortranĉis ilin kaj ja ni restis tri. La postan tagon, ni ankoraŭ daŭrigis la vojon en tiu arbaro kun ili. Ili komencis instrui nin kiel uzi pafilojn, mortigi per maĉeto ,kaj grupajn kondiĉojn . Ni verdire ne ŝatis tiun vivon kaj neniu povas imagi kiom ni suferis. Unu ankoraŭ el ni estis mordita de la venena serpento kaj senzorge la ribeloj rifuzis ke mi kuracu lin kaj foriris, ni tiel restis mi kun mia fratino.

Iun nokton, ni trovis okazon eskapi kaj ni tiel faris, sed malfeliĉe la ribeloj tion konstatis frue kaj eksekvis nin. Niam ni estis tuj kaptota, ni kaŝiĝis en la kaverno kaj ŝanĝis direkton kurante. kiam ni atingis la riveron, ni renkontiĝis kun iu avino kiu estis ĉerpinta la akvon kaj Naris ĉion al ŝi petante helpon, elfore ni ankoraŭ aŭdis bruojn de tiuj ribeloj kaj la avino feliĉe kaŝis nin. Ekde tiam, ni komencis vivi kun tiu avino kiu estis tolerema kaj bonkora. Ŝi havis skaton kiu plenas je orojn. Kvin jarojn poste, ni bedaŭris la morton de tiu avino.

Mi iam renkontiĝis kun turistoj en tiu arbaro, mi montris al ili la orojn ĉar la avino ĉiam rakontis al mi ke la turistoj iam venis kaj donis stipendion al ses personoj en la antaŭaj epokoj kiam ŝi estis naŭjara. La turistoj proponis preni la orojn kaj ili vivtenos kaj studigos min kun mia fratino en la ĉefurbo. Mi senhezite akceptis la proponon kaj tiel mi fariĝis faman arkitekton en la mondo.

**Verkis ETIENNE LUHEKA Kaj MARCELIN LUHEKA**

**RIDO-ANGULO**

===========

**Rampolernejo**

En Lomé vivas edzo-paro. Pro la ĉiama okupiteco de ambaŭ neniu povas prizorgi la domon. La kutimo en la lando rekomendas dungon de iu persono, plejofte knabino, kiu okupiĝu pri la endomaj laboroj.

La edzoparo decidis havi unu tian servanton. La edzo deziris iun knabinon iom grandan, kapablan fari ĉiajn laborojn, sed la edzino konsilis pri knabino kun aĝo inter 10 kaj 12 jaroj. Neniu scias la kialon de tiuj preferoj. La edzo devis cedi al la edzino, kaj la knabino BENITA estis dungita labori en la domo de Fokue kaj Mami.

En la komenco, la viro tiom malŝatis la malpuran knabinon, ke li eĉ ne alparolis ŝin. Nur la edzino montradis al ŝi kion fari.

Jaroj pasis. La manĝjahoj en la domoj de la geedzoj fariĝis por la knabino pli ol sterkoj por plantoj : Benita, kvazaŭ papajarbo, kreskis rapide multe. Bela brusto kun pintaj mamoj, vasta vizaĝo vidiganta rondajn okulojn kaj ĉiaman rideton kun blankegaj dentoj, la gamboj mezdikaj kun harporoj sur la femuro. Benita ofte surmetadis jupeton kaj T-ĉemizon lasantajn videbla ŝian umbilikon kaj la parton de la femuro proksima al la genuo.

La edzo unuafoje furiozis al Benita : "He! Benati, Boneta, kia nomo ! Venu tien ĉi ! Mi maldungos vin, se vi ĉiam hontigas nin per tiuj malpuraj vestoj. Ĉu vi ne scias, ke amikoj altrangaj vizitas nin ? Prenu tiun monon, kaj rapide faru al vi vestojn". Per tremantaj manoj Benita prenis la monon, kiun ŝi poste transdonis al la edzino kun la diroj de la edzo.

"Kial FOKUE povis tion fari ? Ĉu kun bona intenco ?" pensis la edzino, kiu redonis la monon al Benita. Kelkajn tagojn poste, ŝi havigis al si vestojn kaj pomadojn por sin plibeligi.

Iam, reveninte el la laborejo, la edzo, el la profunda ĉambro kriadis :"He! Benati ! Boneta, kia nomo ! Venu tien ĉi !" Ĉiam tremante la knabino, nun belulino, atingis la edzon. "Benita, flustris Fokue, Kial vi tremas ? Ĉu vi ne scias, ke ni ĉiuj estas homoj ? Mi ĉiam notas kiom diligente vi laboras en la domo. Kiam mia edzino ion mal-

bonan faros al vi, ne hezitu, ne timu, rakontu ĉion al mi. Ŝi kaj vi estas samaj. Nun, alportu al mi manĝon!"

Benita preskaŭ sonĝis : " Mi nenian alportis manĝon al li. Kial nun, li tion petis de mi? Ĉiel mi obeu ! Eble, donacoj venos al mi."

Benita devis servi al la mastro, kiu manĝis, antaŭ ol revenis la edzino. "Kial Fokue tiom frue manĝis, kaj kiu servis al li ? Ĉu ne Benita ? Ŝi neniam antaŭe tion faris. Kial nun ? Fokue, Hmmmm, Fokue, ĉio ĉi estas via afero." pensis la edzino, kiu povis nenion eksterigi.

Tagoj pasis. "Mami, ĉu vi ne scias, ke vi devas esti iom pli libera ? Permesu, ke Benita helpu al vi. Tial lastfoje, mi petis, ke ŝi alportu al mi manĝaĵon kaj ŝi perfekte kiel vi, servis al mi."

Jen Benita servadis manĝon al la edzoparo ĝis alkutimigi al la kapricoj de la edzo, kaj integriĝi tute en la domo.

lam, Fokue revenis el la laborejo; li, en la profunda ĉambro, demetis ĉiujn vestojn, escepte de la kalsoneto, kaj : "Benitus, Benita, venu !". La knabino kurege eniris la ĉambron, kaj kiam ŝi ekvidis la mastron, ŝi fermis la okulojn. Fokue alproksimiĝis al ŝi, metis sian maldekstran manon sur ŝian kapon, kaj eklulis : "ĉu vi havas okulodoloron ? Malfermu la okulojn! Malfermu ilin. Kion vi timas ? Vian salajron mi nun duobligas". Ĝuste tiam, kvazaŭ io movigus ŝiajn manojn, ŝi metis unu sur la bruston de Fokue, dum la alia promenadis sur lia dorso. Miela momento por Fokue antaŭ junega feino. Vidu, Fokue estis 55-jara, kaj Benita, dek naŭ.Malgraŭ tiu aĝa diferenco, ili brakumis unu la alian dum longaj minutoj, antaŭ ol li vekiĝis : "Sufiĉe ! Ne jam plu nun. Nokte, mi venos al vi. Kiam vi sentos, ke io palpas vian kapon, sciu, ke estas mia maldekstra mano. Vi do ne timu!". Tiel komenciĝis la alia etapo de la vivo de Benita ĉe Fokue kaj Mami.

La geedzoj kune uzas la liton de la ĉambro, dum Benita, matracon, kaj la salono estas ŝia dormejo. lam, Fokue kompatmiene diris ; "Mami, la sorto de Benita estas tristiga. Ni permesu, ke ŝi kuŝu en la divano de la salono". La edzino ne povis, kiel kutime, ion kontraŭstari, tamen, ŝi decidis kontroli, ĉu efektive Fokue kompatas. Ŝi tute ne sciis, ke Fokue

jam multfoje envenis al Benita sur la matraco, kaj nun deziras uzi la divanon.

La unuajn semajnojn post tio, Fokue ne vizitis Benita-n. Mami konvinkiĝis, ke la edzo estas fidela. Post tiu ripoza tempo, Fokue rekomencis sian noktan viziton al Benita kaj tute libera uzadis la divanon kune kun ŝi. Iam, hazarde, kiam la edzino vekiĝis plennokte, ŝi rimarkis, ke la edzo ne estas apud ŝi. Si devis atendi pli ol duonhoron, antaŭ ol re-endormiĝi, sed Fokue ne revenis. Tamen, ĉe la ellitiĝo ŝi trovis la edzon ronkanta apud ŝi. Ĉu li scias, ke la edzino jam rimarkis lian foreston ? La samo okazis pliajn noktojn, kaj Mami decidis ĉion malkovri. Ĝis tiam la edzo kredas, ke Mami nenion scias jam. Vidu !

Iam, profundanokte, Fokue, ne-sciante, ke la edzino maldormas, malrapide kaj senbrue eliris nuda el la lito, kaj ekrampis al la salono, kie estis kuŝanta Benita atendanta lin. Tuj la edzino ŝaltis la lumon. Vidante, ke la edzo estas rampanta kaj atingonta la divanon, ŝi krie demandis :

- Kion mi vidas?
- rampadon de homo. Mi lernas rampi, respondas Fokue.
- Ĉu vi, tiom maljuna, nun lernas rampi ? Ĉu vi bebiĝas
- Mi estas la ĉefo de la domo, replikis la edzo per friponeca kolertono. Mi rajtas kion ajn fari, marŝi, kuŝi kie ajn, rampi, kaj eĉ kuŝi en divano. Ĉu mi kulpas ?

Kio okazis poste ?

Ĉiu divenu por si!

**RAKONTOJ**

=============

**ALLOGA LOKO**

Herbejo troviĝas ĉirkaŭ la vilaĝo.En tiu herbejo, vivas porkoj, kaj al ĝi iras homoj. La porkoj ne estas sovaĝaj bestoj, sed apartenas al vilaĝanoj. Okazas ĉiutage en la herbejo scenoj malgrandaj inter la vilaĝanoj kaj la porkoj.

Apenaŭ vilaĝano iras la herbejon, aŭdiĝas grunto de porkoj. La vilaĝano tamen daŭrigas sian iradon por trovi taŭgan kaŝejon sub arbedo, kie li povas facile kaj trankvile feki. Tiutempe porkoj fikse rigardas la vilaĝanon. Ili atendas, gvatas la venon de io el la anuso de la vilaĝano.

La vilaĝano rigardas ĉirkaŭ sin por certigi, ke neniu homo troviĝas apude. Poste li kaŭras, kaj porkoj tuj alproksimiĝas al li. Ĉe la falo de la unua pecego da fekaĵo el la vilaĝano la porkoj gvatantaj salivas, lekas siajn lipojn (se lipojn ili havas). Tiam la fekanto pli streĉas sian ventron je maksimumo da fekaĵo, kiu venigas lin en la herbejon. La porkoj ĉiam atendas ; ili neniel timas la fekantojn. Plejofte, ĉe la falo de la unua pecego da fekaĵo, la porkoj tiom salivas, ke ili ne sukcesas regi sin, paciencigi iomete ; ili paŝas al la fekanto, kiun ili forŝovas per siaj faŭkoj kaj ekmanĝas la fekaĵon.

Kutime la porkoj atendas ĝis la fino de la fekado kaj foriro de la fekanto, antaŭ ol alproksimiĝi al la fekaĵo. Por malhepi la porkojn forŝovi la fekanton, homoj, ĉefe infanoj, iras en la herbejon kun bastono en la mano. Per tiu bastono ili timigas la porkojn, kiuj atendas iom malproksime la fekanto.

Jes ĉe la herbejo oni manĝas, ĉe la herbejo oni fekas. La unua ONI koncernas la porkojn, dum la dua temas pri la homoj kaj la porkoj. La fekaĵoj de la porkoj restas kompatindaj en la herbejo, ĉar neniu bezonas ilin. Ili nur malpurigas ŝuaĉojn de la vilaĝanoj vizitantaj la herbejon.

Ekzistas en kelkaj vilaĝoj ejoj kun ĉirkaŭmuroj aŭ bariloj. Tie oni bredas porkojn. Ŝajnas, ke homaj fekaĵoj estas apartaj ŝataĵoj por porkoj. Homoj vizitas tiujn ejojn por deponi la aferojn, al kiuj rapidas la porkoj. Tamen gravas tuj mencii, ke ne ĉiujn fekaĵojn manĝas la porkoj. Ŝu en la herbejo, ĉu en la ejo ĉirkaŭmuritaj, porkoj impetas al fekaĵoj, kaj poste retroiras sen manĝi iom. Ĉu ekzistas ankaŭ bongustaj kaj bonodoraj fekaĵoj ? La porkoj povas respondi tiun demandon. Sed mi iam en mia kaŝejo rigardis iun alian fekanta antaŭ mi. Tuj post kiam li leviĝis, la porkoj alproksimiĝis al la fekaĵo, flaris ĝin,

kaj poste grumblis : ili skuis la kapon kaj neniom manĝis. Mi poste rigardis la aferon: ĝi estas tre nigra kun semoj de baobabofrukto.

Herbejo estas loko grava kaj por la vilaĝano kaj por la porkoj de la vilaĝanoj.

**CLUSE Zissè Florent**

## 2-LA VIVA KAJ LA NUTRA KONDIĈOJ DE LA PORKOJ EN ANYRONKOPE

La porkoj libere promenas ĉirkaŭ miaj kabanoj, kaj laŭe de niaj vilaĝoj, serĉante ĉiam ion por manĝi.

Per siaj faŭkoj ili movas, esplorfosas la grundon por trovi nutrajn radikojn. Se porko eniras plantejon, estas malfeliĉo por la proprietulo de la plantejo : ĝi eltirigas la plantojn, avide manĝas junajn ĉosojn, kaj sekve la terkulturistoj nenion rikoltas.

La porko estas manĝavida ; estas bona por la porko : restaĵoj de la kuirejo, ĉeloj, legomaĵoj, (mal) puraj fruktoj, insektoj, ktp grasigas la beston. La porko ŝatas malsekon ; ĝi amas lavi sin en truo da malpurega akvo.

La porka viando estas tre nutra. Ĝia saneco dependas de la maniero, laŭ kiu ĝi estas kuirata ; oni bonege kuiru ĝin, ĉar ĝi enhavas larvojn kaj tenietojn, kiu povas eniri la inteston de homo, kaj tie fariĝi grandega vermo.

Tiu tenio estas mortigebla per longega kuirado.

DRAVIE Etsri Firmin
07 B.P. 13169 Lomé 07
Lome
Togo

**ANONCETOJ**

=============

**I- Servoj de ACE**

===============

**1- Subtenagado de ACE**

ACE (Afrika Centro Esperantista) daŭrigas sian subtenagadon al Esperantistoj precipe afrikaj. Kiu ŝatus ion entrepreni Esperante kaj deziras ricevi subtenon de ACE, tiu tuj rilatu kun ĝi disponigante :

i- Raporteton pri la agado en 2022 kun financa bilanco de la jaro

ii- Priskribon de la agado, kiun oni planas en 2023 kun akompana buĝeto

iii- Petleteron en kiu oni menciu kion oni deziras ricevi de ACE. Se temas pri grupo/asocio, oni aldonu la liston de la estraranoj kun unuopaj adresoj.

Ankaŭ unuopulo rajtas peti helpon, liverante nur la suprajn informojn.

**2- Aparta alvoko al esperantistoj en landoj najbaraj al Togolando**

Iom da memorigo pri la afrika agado de Hans BAKKER montras kiom Togolando, Ganao, Benino, Niĝerio kaj Kotdivuaro kunlaboradis ekde la jaro 1990. Esperantistoj el tiuj landoj kune okazigis la tri unuajn AKE: 1990 en Togolando, 1991 en Benino kaj 1993 en Ganao. Plie, togolandaj kongresoj partoprenadis esperantistoj en tiuj landoj, kaj ankaŭ togolandaj esperantistoj partoprenis la unuan kaj ĝis nun solan nacian kongreson en Benino en 2005. Seminarioj diverse okazadis en Togolando kun partopreno de Esperantistoj el tiuj landoj.

ACE nun taskas al si kunlabori kun esperantistoj ke tia kunlaborado pluestu. Tial ĝi petas de tiulandaj esperantistoj rilati kun ĝi ke nun estu starigita laborplano por la daŭrigo alimaniera de la afrika agado en tiu ĉi afrika parto.

Interesiĝantoj tuj rilatu kun ACE.

**3- Antenigo kaj anteniĝo de ACE**

En la realigo de sia programo en 2023, ACE proponas:

i- Starigi tra Afriko antenojn. Temas pri Esperantistoj unuopaj aŭ grupaj, kiuj ŝatus reprezenti ACE-n en sia loĝloko. La laboro farenda estas kunlabori en la realigado de la programo de ACE en la jaro. Ne estos salajroj sed ACE pagos ĉiujn kostojn rilate la laborojn.

Kiu ŝatus esti antenon de ACE en sia loĝloko, tiu tuj rilatu kun ĝi tra la adreso de la redakcio de KomACE.

**ii- Reprezentado de instancoj en Afriko**

ACE pretas reprezenti en Afriko kaj aparte en Togolando ĉiujn instancojn kiuj ŝatas vastigi sian agadon en Afriko/Togolando.

**II- KOMUNA EUROPA REFERENCO-KADRO POR LINGVOJ (KERKL)**

==================================================

La terminon KERKL uzas ACE por subteni afrikajn esperantistojn majstri la lingvon Esperanto. La nunan tiucelan eksperimenton ĝi faris en julio 2022 instruante Esperanton al la geinstruistoj de Instituto Zamenhof tiel uzante sian sistemon ACE-LiTe (ACE-Lingvo -Testilo), simple LiTe.

Eble, oni povus demandi, kial EUROPA kaj ne AFRIKA. La simpla respondo estas, ke preskaŭ ĉiuj lingvoj afrikaj estas ne jam skribitaj, kaj Esperanto kun radikoj europlingvaj jam eniris vejnojn de afrikanoj. Necesas havi efikan ilon por enradikigi Esperanton en Afriko kaj jen UTILEGAS KERKL.

En Esperantujo, la unua instanco kiu proponis tiun Referenco-Kadron al Esperantistoj estas la Esperanta Civito kun ties LTSEC (LingvoTesta Sistemo de la Esperanta Civito), kiu tiam proponis la nomon Esperantan KEFR (Komuna Esperanto-Framo de Referenco) al la Europa Referenco-Kadro en Esperantujo. Tiam Giorgio SILFER rilatis kun IEK (Internacia Ekzamena Komisiono de ILEI) ke estu kunlaboro inter Civito kaj ILEI/UEA por tio ĉirkaŭ la jaro 2003. IEK estis favora kaj la tiama prezidanto de IEK, Duncan ĈARTERS (nuna prezidanto de UEA) povis renkonti kun Giorgio SILFER kaj vere admiris la diligenton de tiu ĉi homo. La sekvon oni povus diveni.

Devis, ĉirkaŭ la jaro 2008, naskiĝi KER (Komuna Esperanta Referenco-Kadro) de EDUKADO.NET apartenanta al Katalina KOVATS, kiu estis vicprezidanto de IEK, kiam la Esperanta Civito faris la proponon al la ekzamena komisiono de ILEI/UEA. Memorindas, ke tiam ankaŭ GBEGLO Koffi estis membro de la ekzamena komisiono. Li do akiris iom da spertoj por ion proponi al sia Afriko.

Baziĝante sur la aserto de sia majstro Hans BAKKER ĉirkaŭ la jaro 2006, li nun iniciatis ion en Afriko. Kion ĝuste diris Hans tiam, certe tion oni povus legi. Jen : «Mi ne komprenas kial oni batalas por tiuj ekzamenoj (laŭ la europa referenco-kadro). La teksto pri ili estas en la reto kaj ĉiu ajn rajtas traduki ĝin en sia lingvo kaj apliki ĝin ». Jes, ja ! LiTe tute en ordo naskiĝis kun sia KERKL, ĉu ne ?

Decas mencii tuj, ke ekzistas Esperanto-ekzamenoj antaŭ la naskiĝo de la Europa Referenco-Kadro en 1991. Do la ekzistantaj ekzamenoj estas

nomataj MOVADAJ dum tiuj de la Europa Referenco-Kadro estas INTERNACIAJ. Pli pri tiuj aferoj KEFR, KER kaj KERKL povos aperi pli da vortoj, se oni estos preminta tiucelan ŝaltilon.

Unuaj tiaj ekzamenoj jam okazis kaj baldaŭ aliaj okazos en Togolando kun vastigo al la tuta Afriko

**Sukceson al KERKL**



**De maldekstre al dekstre, sinjoroj SAGBADJELOU Kokou, GBEGLO Koffi kaj ATTIOGBE-AGBEMADON Biova Mensah al la 22-a TEK.**

## KIEL RICEVI HACE-n paperan kaj sesmonatan ?

1- Per abono: 15 euroj estas la abonprezo

2- Subtenante ACE-: disponigante monon, ekz. 20 eurojn aŭ pli.

La monon oni ĝiru al la konto "acex-e" ĉe UEA. Posta informo

al ACE pri la pago rajtigas ricevi ambaŭ numerojn de la jaro.

## KIEL RICEVI LA RETAN VERSION DE HACE ?

Necesas aliĝi al la tiucela dissendolisto.

Tio ebligas ankaŭ ricevon regulan de informoj pri la movado en Togolando.

Oni do sendu malplenan mesaĝon al :

afriko-kunsentantoj-subscribe@googlegroups.com

Memvola mondonaco estu sendita al supre indikita konto de ACE.

## KUNLABORANTOJ

HACE estas ĉies propraĵo. Do, ĝi konsideras ĉiujn Esperantistojn kunlaborantoj.

La kontribuaĵojn oni sendu al la redaktanto.

## LA VENONTA NUMERO

Aperos pli malfrue en decembro 2023

Artikoloj por tiu numero atingu la redakcion kiel eble plej frue

## REPRESO

Ĉiu homo rajtas ĉiel ajn uzi la artikolojn de HACE.

Sola kondiĉo estas, ke oni indiku la fonton.

**HORIZONTO DE AFRIKA CENTRO ESPERANTISTA H A C E Liberpensa informilo de AFRIKA CENTRO ESPERANTISTA**

**Redaktado** : Dr Parfait SIM

**Provlegado kaj Korektado**: SAGBADJELOU Kokou, GBEGLO Dzifa

**Pretigado por publikigado**: GBEGLO Dzifa

**Adreso** : afrikacentro@hotmail.com